# ZAKOPANE
## TATROJ KAJ PIENINY

3.

# Landa Turista Ligo en Kraków

La oficejo donas senpage informojn buŝe kaj skribe pri ĉiuj aferoj rilatantaj la vojaĝon kiel ankaŭ pri kurac- kaj aer- lokoj kaj someraj restadejoj, pri vidindaj regionoj, sportoj k. t. p. Oficaj horoj de 9-12 kaj de 3-8. Informejoj en kaj eksterlandaj.

Ĉiuj ligoj turistaj kaj vojaĝaj en Aŭstrio.

**Lwów:** Turista Societo. Pasaż Hausmana 9. **Rabka:** Apoteko. **Stanisławów:** Filio de Landa Turista Ligo. **Zakopane:** Dworzec Tatrzański, **Warszawa:** Vojaĝ-oficejo. M. Ryczkowski, Plac Saski 2. **London**: The Austrian Travel und Informationsbureau. W. Piccadilly 86. **Haag:** Bureau voor Handels und Reiseverkehr (Columbosstraat 225). **München:** Auskunftsstelle für den gesamten Reiseverkehr in Österreich (Weinstrasse 7.) **Nizza:** Oficiala aŭstria vojaĝinformejo, 2 Avenue Masséna. **Trieste:** Generala Direkcio de aŭstria Lloyd.

---

## ENURBA OFICEJO

DE I. R. AŬSTR. ŜTATAJ FERVOJOJ EN KRAKÓW ĈE LA LANDA TURISTA LIGO STR. SZPITALNA 34. — TELEFONO 1385.

Liveras rondvojaĝajn biletojn laŭ oficiala tarifo (krom biletoj por militistoj).

Donas senpagajn informojn buŝe kaj skribe rilate la biletprezojn, la plej oportunajn vagonarojn k. t. p., liveras kunmeteblajn biletojn kaj rabatilojn jarajn, duonjarajn k. t. p.




Polski Związek ... Koło w Nowym Sączu ul. Sienkiewicza 75 33-300 Nowy Sącz
Inw 193/79

## Zakład Wodoleczniczy

Dra CHRAMCA w Zakopanem

Tow. Akc. Otwarty cały rok. Tow. Akc.



## Hidropatia Instituto

de Dro CHRAMIEC en Zakopane

Akc. Societo. **Malfermita la tutan jaron.** Akc. Societo.

# K. TOMASZEWSKI

ZAKOPANE, KRUPÓWKI L. 31.

KONTRAŬ LA HOTELO „MORSKIE OKO“

Poleca:

Bieliznę męską z marką „Lwa“. Bieliznę trykotową, Skarpetki, Pończochy, Krawaty, Sztylpy, Czapki, Żakiety wełniane, Kalosze petersburskie, Parasole, Perfumy, Wyroby skórkowe, Przybory do podróży, Grzebienie, Szpilki i t. d.

Rekomendas:

Tolaĵon por sinjoroj kun signo „Lwa“. (Leono) Trikotaĵojn, Ŝtrumpojn, Ŝtrumpetojn, Gantojn, Kravatojn, Tibiingojn, Ĉapojn, Jaketojn lanajn, Galoŝojn peterburgajn, Ombrelojn, Parfumojn, Ledajn fabrikaĵojn, Kombilojn, Pinglojn k. t. p.





Magasin Français

## J. BÈZE

ZAKOPANE, KRUPÓWKI

OBOK HOTELU KARPOWICZA

Poleca pamiątki zakopańskie po cenach przystępnych.

Empfiehlt Zakopaner Andenken zu mässigen Preisen.

Recommande des souvenirs de Zakopane à prix moderés.

Rekomendas Zakopane'ajn memoraĵojn je moderaj prezoj.

MAGASIN FRANÇAIS

J. BÈZE

ZAKOPANE — KRUPÓWKI

PRÈS DE L'HÔTEL KARPOWICZ.

SPÓŁKA HANDLOWA W ZAKOPANEM
ZAREJESTROWANA Z OGRANICZONĄ PORĘKĄ .·. TELEFON NR. 3.
KRUPÓWKI BAZAR POLSKI.

Poleca w doborowym wyborze i po cenach nizkich: łakocie i inne środki spożywcze .·. Przybory do turystyki .·. Rzeźby .·. Wina, wódki, koniaki i piwa.



SPÓŁKA HANDLOWA EN ZAKOPANE
KOMPANIO REGISTRITA KUN LIMIGITA RESPONDECO. TELEFONO 3.
STRATO KRUPÓWKI, BAZAR POLSKI.

Rekomendas bonkvalitajn kaj malkarajn frandaĵojn kaj aliajn konsumajn produktojn. Turistaj iloj. Skulptaĵoj. Vinoj, brandoj, konjakoj, bieroj.

# ILUSTRITA GVIDLIBRO TRA ZAKOPANE, TATROJ KAJ PIENINY

En pola lingvo verkis
**JAN RUSIN.**

Eldonis la Organiza Komitato de la Oka Kongreso en Kraków,
1912.

91
KSIĄŻNICA PODLASKA
im. Łukasza Górnickiego
Nr 4132
FILIA Nr 14
w Białymstoku

PRESEJO DE W. POTURALSKI PODGÓRZE-KRAKÓW.



# Klarigoj pri pola fonetiko.

**La pola alfabeto konsistas el sekvantaj literoj:**

a, ą, b, c, cz, ć, d, dz, dź, dż, e, ę, f, g, h, ch, i, j, k, l, ł, m, n, ń, o, ó, p, r, rz, s, sz, ś, t, u, w, y, z, ź, ż.

## Elparolado.

| Polaj sonoj | Klarigoj | Polaj sonoj | Klarigoj |
|---|---|---|---|
| ą | naza sono: precize kiel la franca „on". | ń | precize kiel la franca „gn" |
| ć | proksimume kiel en Esp „ĉ". | ó | kiel en Esp. „u" |
| ch | kiel en Esp. „ĥ" | rz | kiel en Esp. „ĵ" |
| cz | kiel en Esp. „ĉ" | ś | proksimume kiel en Esp. „ŝ" |
| drz | kiel en Esp. „ĝ", | sz | kiel en Esp. „ŝ" |
| dź | proksimume kiel „ĝ" | trz | proksimume „ĉ" |
| dż | kiel en Esp. „ĝ" | w | kiel en Esp. „v" |
| ę | naza sono: precize kiel la franca „un" | ź | proksimume „ĵ" |
| i[1]) | inter konsonanto kaj vokalo kiel „j" | ż | kiel en Esp. „ĵ" |
| ł | kiel la sono „l" en la angla „all" | y[2]) | proksimume kiel la latina „y". |

[1]) ekz. „miasto" elp. kiel „mjasto", „wiecha" kiel „vjeĥa".

[2]) neniam kiel „i". Inter konsonanto kaj vokalo kiel „j"; ekz. „Kalwarya" kiel „Kalvarja".

**Rimarko**: Ĉiuj aliaj literoj, ne cititaj en ĉi tiu tabelo estas tute same elparolataj kiel en Esperanto



Montarano el Zakopane.

## Vojaĝo el Kraków al Zakopane.

Oni aĉetas vojaĝbileton en fervoja oficejo ĉe strato Szpitalna (Ŝpitalna) aŭ en biletvendejo de l'stacidomo. La unua klaso de rapida vagonaro kostas Kr. 21.30; II. kl. 13.50; III. kl. 7.80. La prezoj por persona vagonaro estas: I. kl. 16.40; II. kl. 10.40; III. kl. 6 Kr. Ekzistas ankaŭ dum someraj monatoj biletoj iraj kaj revenaj kun 40% da rabato kaj kun 2-taga valoro.

La vagonaro, forlasinte la stacidomon, traveturas la riveron Wisła (Vistulo) kaj haltas en Podgórze-Płaszów. Poste ĝi trapasas la banlokon Swoszowice (Svoŝovice) kaj rapidas al **Skawina**, loko posedanta bierfarejon kaj kelkajn aliajn fabrikejojn, kion pruvas tie kaj ie videblaj kamentuboj. Dumvoje ni vidas en malproksimo Krakovon, termonumenton de Kościuszko, kaj meze de arbaro, la monaĥejon de Kamedulоj. La valoj mallarĝiĝas kaj ni alvenas al **Kalwarya**. En okcidento oni vidas la monaĥejon de Bernardanoj, konstruitan en la j. 1619. de Mikołaj Zebrzydowski. Pri la monaĥejo oni rakontas multajn legendojn kaj istoriojn. Precipe atentinda estas tie, tre malnova

bildo de S-a Dipatrino, pentrita sur tolo. Iam ĝi estis propraĵo de familio Paszkowski, kaj nur en la j. 1641 ĝi estis transportita en la monaĥejan preĝejon. Krom tio la monaĥejo posedas ankaŭ kelkajn aliajn pentraĵojn, devenantajn el unua duono de XVII. jarcento.

Multe pli malnova ol la monaĥejo estas la kapelo de S-a Magdaleno, kaŝita en arbaro je kelkcent paŝoj okcidente. Proksime de ĝi suprenleviĝas ankoraŭ ruinoj de kastelo, restaĵoj el la XIII. jarcento. Iam ĝi apartenis al familio Włodek, el kiu la lastan, famekonatan Katerinon Włodek, pro multaj krimoj la pola reĝo Sigismundo III. ordonis brulmortigi kaj detrui la kastelon, el kies restaĵoj oni kelkajn jarojn poste konstruis la kapelon de S-a Magdaleno. Kalwarya similas al famekonata Lourdes. Ĉi tien alvenas kelkfoje dum jaro miloj da piaj pilgrimantoj el malproksimaj regionoj de tuta Polujo.

Forlasinte la stacidomon, la vagonaro rapidas sur deklivo en valon de Skawa-rivero kaj alvenas al **Sucha**, kie troviĝas malnova kastelo de grafoj Branicki. Ni haltas ĉi tie 20 minutojn. Tiu tempo sufiĉas por ion manĝi. El Sucha, tra mallarĝa valo de Raba-rivero la vagonaro veturas orienten, kaj trapasinte **Maków**, kun ruinoj de iamaj ferfandejoj, alvenas al **Chabówka**. Intertempe en sud-okcidenta parto aperas



antaŭ niaj okuloj la montpinto Babia Góra (Babja Gura 1625 m) sur fundo de belega panoramo.

Pasinte Chabówka'n, la vagonaro kuras tra profundaj intermontoj aŭ suprengrimpas sur krutaj kaj rokaj deklivoj de la lasta montĉeno de „Wysoki Beskid“. Antaŭ ni, kiel el sub la tero, elkreskas la gigantaj pintoj de Tatra-montoj, nudaj, rokaj, ornamitaj tie kaj ie per eterna neĝo. Kaj ĉe iliaj piedoj etendiĝas ĉarma valo de **Nowy Targ**, dividita per arĝenta rubando de la rapidflua rivero Dunajec. Nowy Targ, la ĉefurbo de ĉi-tiea montoplena regiono, estas la plej granda urbo, kiun ni dum nia vojo al Zakopane renkontas.

La vagonaro, kvazaŭ provante nian paciencon, malrapide moviĝas antaŭen. Antaŭ niaj okuloj preterŝoviĝas, kiel en kalejdoskopo, belaj en Zakopane'a stilo konstruitaj vilaoj de Poronin. Ĝi estas kvazaŭ antaŭurbo de Zakopane. Ankoraŭ kelkaj minutoj, kelkaj turn-kurbiĝoj kaj ni estas ĉe la celo de nia vojaĝo, en Zakopane.

## Hoteloj.

H. „**Centralny**“, angulo de Krupówki — Rynek
H. „**Karpowicz**“, Krupówki str. Nr. 46.
H. „**Klemensówka**“ Jagiellońska str. 38.
H. „**Morskie Oko**“, Krupówki str.
H. „**Pod Giewontem**“, angulo de Krupówki kaj Nowotarska str.
H. „**Stamary**“, Marszałkowska str.
H. „**Staszeczkówka**“, Krupówki Nr. 11.
H. „**Turystów**“, Zamojskiego str.
H. „**Warszawski**“, Rynek k. a.

## Pensionoj.

„**Gierlach**“, Krupówki“ str. (v. a.)
„**Klemensówka**“, Jagiellońska str. 38. (v. a.)
„**Krywań**“, Ogrodowa str. 5 (v. a.)
„**Liliana**“, Chramcówki (v. a.)
„**Modrzejów**“, Jagiellońska str. 3 (v. a.)
„**Piotrkowianka**“, Jagiellońska-Sienkiewicza str. (v. a.)
„**Podlasie**“, Zamojskiego str. (v. a.)
„**Wanda**“, Zamojskiego str. (v. a.)
„**Zakątek**“, Chramcówki str. 44. (v. a).
„**Jerzewo**“, Jagiellońska str.
„**Zagórze**“, Kasprusie str. 27. k. m. a.



## Restoracioj.

En ĉiuj hoteloj escepte H. „**Centralny**“.
Krom tio **Przanowski**, angulo de Krupówki kaj Marszałkowska str.
**Niklas**, Krupówki str. 20.
**Dziadulski**, Chramcówki str. k. a.; ankaŭ en pensionoj.

## Sukeraĵejoj.

**Przanowski**, angulo de Krupówki — Marszałkowska str.
H. „**Morskie Oko**“, Krupówki.

## Monŝanĝejoj.

**W. Świeprawski**, Krupówki str. 37.
**A. Modliński kaj Kio**, Krupówki str. 42.

## Spicvendejoj.

**Spółka handlowa**, Kościeliska str. 14.
Du filioj: Krupówki str. 59; Chramcówki str. 16. (v a.)
**Kółko rolnicze**, Krupówki str. 23.
Du filioj: Kościeliska str. 1; Chramcówki str. 2. (v. a)
**Słowik Fabian**, angulo de Krupówki, Przecznica str. k. a.

## Bazaroj.

**Krzyżak Antoni**, Krupówki str. 30 (v. a.)
**Tomaszewski K.**, Krupówki str. 35. (v. a.)
**Magazin français**, Krupówki 42. (v. a.)
**Komendziński**, Krupówki 44. (v. a)
**Ciszewski**, k. a.

## Laktejoj.

**„Mleczarnia Hygieniczna“**, Krupówki 72.
**Zakład kefirowy i mleczarnia**, Krupówki str. 49.
**Łuczanowicka**, Krupówki str. 25.

---

**Fotografistoj: Studnicki**, Nowotarska 21. — **„Stefa“** Krupówki str. 57. (v. a).

**Tabak-vendejo**, Krupówki str. 55.

**Librejo kaj pruntejo de muziknotoj**, Zwoliński L.

**Apoteko: F. Tabeau**, Krupówki str. 17.

**Drogejo Clossman** Krupówki str. kontraŭ H. Morskie Oko.

**Publika legejo**, Krupówki str. 45., malfermita tutan jaron posedas kelkdekon da diversaj gazetoj.

**Komunumestrejo**, Nowotarska str. Ĉiutage de 9—12, kaj de 3—6.

**Poŝt-telegraf- kaj telefon-oficejo**, Krupówki str. de 8—12 kaj de 2--6, escepte dimanĉ-kaj festotagoj. Filio en stacidomo kaj en Kuźnice.

**Muzeo de Chałubiński**, Chałubińskiego str. (vizitinda) Enirpago 20 h. dum somera sezono de 10 – 12 kaj de 2 – 5 escepte dimanĉ-kaj festotagoj.

**Tatra Turista Societo**, Krupówki 14. klopodas pri esplorado de Tatraj montoj, plifaciligas ilian vizitadon k. t. p. Ĝia konstanta oficejo en Kraków. En Zakopane ĝi prizorgas gvidistojn tra la montoj. Oni dividis la gvidistojn je tri klasoj:

Al I. kl. de gvidistoj oni pagas Kr. 6 potage
„ II. „ „ „ „ „ „ 5 „
„ III. „ „ „ „ „ „ 4 „



Ce pli malfacilaj ekskursoj oni devas ankoraŭ pagi al gvidisto krom la difinita supre sumo la pluan salajron de 1—4 kronoj.

**Libervola Tatra Societo por tuja helpo** al turistoj perdintaj la vojon en montoj aŭ pereintaj.

**Metia lernejo** de ligna industrio, Krupówki str. 10; ekspozicio de skulptaĵoj; eniro senpaga.

**Landa Lernejo** de puntfarado, ekspozicio; eniro senpaga.

**Asocio „Kilim“**, Krupówki 74. Teksado de diversspecaj tapiŝoj (Vizitinda!) Eniro senpaga

**Hidropatia kuracejo de Dro Chramiec** (v. a.) Malfermita tutan jaron. Rekonstruita. 300 ĉambroj. Banejo moderne aranĝita. Restoracio, dancsalono k. t. p.

**Sanigejo de Dro Havranek**, Chałubińskiego str. 3. aranĝita laŭ ĉiuj postuloj de higieno. Komforte meblitaj ĉambroj.

**Ĥirurgia sanigejo de Dro Gawlik**, Rynek 14. Ĥirurgia laborejo, lukse aranĝita.

**Sanatorio por brustmalsanoj de Dro K. Dłuski**, 5 klm de la stacidomo, malproksime de la strato, meze de piceaj arbaroj. 100 ĉambroj komforte aranĝitaj, teatra salono, legejo, biblioteko, banejo, akvokonduko, centra hejtado, elektra lumigado, poŝt-telegraf-kaj telefon-oficejo.

## Tarifo de fiakroj kaj veturiloj.

| Por veturado | veturilo | | | | fiakro | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | 1-ĉevala | | 2-ĉevala | | 1-ĉevala | | 2-ĉevala | |
| | Kr. | h | Kr. | h. | Kr. | h. | Kr. | h. |
| **Por veturado al aŭ de la stacidomo:** | | | | | | | | |
| el event. al ĉiuj punktoj en la limoj de la kuracloko . . . . . | — | 60 | 1 | — | 1 | — | 1 | 60 |
| el ev. al punktoj en Żywczańskie, Skibówka, Bystre . . . . . | 1 | — | 1 | 60 | 1 | 50 | 2 | 50 |
| el ev. al la Sanigejo en Kościeliska . | 2 | — | 3 | 20 | 3 | — | 5 | 20 |
| **Por veturado sur la teritorio de la kuracloko:** | | | | | | | | |
| tage . . . . . . . . | — | 30 | — | 50 | — | 50 | 1 | — |
| nokte . . . . . . . . | — | 50 | — | 70 | — | 70 | 1 | 20 |
| al Bystre, Adasiówka, Żywczańskie, Skibówka: | | | | | | | | |
| tage . . . . . . . . | — | 60 | — | 80 | — | 80 | 1 | 50 |
| nokte . . . . . . . . | — | 80 | 1 | — | 1 | — | 1 | 70 |
| por ĉiuj 15 minutoj da atendado . | — | 20 | — | 40 | — | 30 | — | 50 |
| **Por veturado laŭ la tempo:** | | | | | | | | |
| por ĉiu kvaronhoro: | | | | | | | | |
| tage . . . . . . . | — | 30 | — | 50 | — | 50 | 1 | — |
| nokte . . . . . . . | — | 50 | — | 70 | — | 70 | 1 | 20 |



| Por veturado | veturilo 1-ĉevala Kr. | h | veturilo 2-ĉevala Kr. | h. | fiakro 1-ĉevala Kr. | h. | fiakro 2-ĉevala Kr. | h. |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| **Por veturado al difinitaj punktoj:** | | | | | | | | |
| *a)* al Jaszczurówka, Kuźnice, Leśniarka, Olcza, Strążyska aŭ inverse . . | 1 | — | 1 | 80 | 1 | 50 | 3 | — |
| *b)* al la samaj lokoj kun duonhora atendado kaj revene . . . | 1 | 40 | 2 | 40 | 2 | 10 | 3 | 60 |
| *a)* al Poronin (stacidomo) Sanigejo aŭ inverse . . . . . . | 1 | 80 | 2 | 60 | 2 | 20 | 3 | 60 |
| *b)* al la samaj lokoj kun ½-hora atendado kaj revene . . . . | 2 | 40 | 3 | 20 | 2 | 80 | 4 | 20 |
| por ĉiuj 15 minutoj da atendado . | — | 20 | — | 40 | — | 30 | — | 50 |
| *a)* al la valo Kościeliska (restoracio) kaj revene, en la sama tago . | 5 | — | 8 | — | 7 | — | 12 | — |
| *b)* al la valo Kościeliska („Pisana“) kaj revene, en la sama tago . . | 6 | — | 10 | — | 8 | — | 14 | — |
| *a)* al Roztoka kaj revene, en la sama tago | 8 | — | 12 | — | 12 | — | 16 | — |
| *a)* al Morskie Oko kaj revene, en la sama tago . . . . . . | 10 | — | 16 | — | 14 | — | 20 | — |
| *b)* al Morskie Oko kaj revene, dutaga ekskurso . . . . . . | 14 | — | 20 | — | 18 | — | 28 | — |
| al la valo Chochołowska kaj revene en 1 tago . . . . . . | 9 | — | 14 | — | 13 | 50 | 21 | — |
| al Nowy Targ kaj revene en 1 tago | 5 | — | 8 | — | 7 | — | 12 | — |
| al Szczawnica kaj revene en 2 tagoj | 10 | — | 18 | — | 15 | — | 27 | — |

Rimarkoj: 1) Por la venigo de fiakro antaŭ la domon kaj por atendado ĝis 10 minutoj oni pagas neniom. 2) La nokta tarifo estas aplikata en la monatoj: de I/X—31/III inter la 8 h. vespere kaj la 6 h. matene; en ĉiuj aliaj monatoj inter la 10 h. vespere kaj 5 h. matene. 3) „Veturiloj“ [pole: „furka“] estas vilaĝanaj, per tola ŝirmilo kovritaj veturiloj, kies sidlokoj estas provizitaj per risortoj; por veturado sur malbonaj ŝoseoj ili estas preferindaj ol la fiakroj. 4) Por transporto de pakaĵoj pli pezaj ol 50 kg oni alpagas 30 h.

## Zakopane.

La nomon Zakopane ni renkontas por la unua fojo en kolonia privilegio de pola reĝo Stefan Batory en la j. 1578., en kiu ĉi dokumento estas difinitaj la limoj de la bieno, rajtoj kaj profitoj, kiujn la loĝantaro de Zakopane rajtis utiligi. En la tempoj de Pola Respubliko, Zakopane apartenis al reĝaj bienoj; hodiaŭ ĝi estas propraĵo de grafo Zamojski.

Zakopane estas la ĉefa centro de turisma movado kaj vivo ĉe Tatraj piedoj. Ĝi estas multnombre vizitata ne nur de la ĉi-tieaj, sed ankaŭ de fremdaj turistoj. Ĉiun, kiu nur unufoje estis en Zakopane, allogas senĉese ne nur la saniga, montara aero, sed ankaŭ la ekstreme ĉarma situacio de Tatroj, kun sia kruda sovaĝeco de l' naturo.

Zakopane, iam vilaĝo, estas nun aranĝita tute laŭ eŭropa maniero. Multaj stratoj trakuras ĝin laŭlonge kaj laŭlarĝe. De la stacidomo oni povas per veturilo alveni al ĉiu punkto de Zakopane. La prezoj por fiakroj kaj veturiloj estas fiksitaj de **Registara Komisio** fondita



ĉi tie en la j. 1886. La estraro de la Komisio, oficanta de 9 — 12 antaŭtagmeze kaj de 4 — 6 posttagmeze donas detalajn informojn pri adresoj k. t. p. kaj prenas depagon de personoj, restantaj ĉi tie pli longe ol 48 horojn. Por la unua semajno 2 kr, por la sekvantaj 5 semajnoj ankaŭ po 2 kr de ĉiu persono. Tiuj, kiuj loĝas 6 semajnojn aŭ pli longe pagas 12 kr.

Somere alvenas al Zakopane ĉirkaŭ 15000 personoj. Inter ili estas ne nur turistoj, sed ankaŭ homoj, serĉantaj ĉi tie dum someraj varmegoj ripozon, distradon aŭ sanon.


Oni tamen renkontas ĉi tie plejgrandparte turistojn, ĉar Zakopane estas sendube la plej bona kaj plej oportuna elirpunkto por ĉiuj ekskursoj en la Tatrojn. La sezono daŭras la tutan jaron, sed la somera sezono nur dum julio, aŭgusto kaj duono de septembro.

Sed ne nur en someraj monatoj Zakopane estas vizitinda. Vintre kvankam montegaj pintoj ne estas atingeblaj, tamen oni povas sur pli proksimaj montetoj uzi vintrajn sportojn: glit- kaj ski-veturadon. Ili allogas vintre grandegan nombron da sportuloj, kiuj ĉi tie sur la plej oportuna teritorio ĝuas la tutan plezuron, kiun povas al ili doni la neĝaj amasoj kaj tute bona glitveturila vojo.

## Ekskurso tra Zawrat (Zavrat) al la lago „Morskie Oko“.

Ĉi tiu ekskurso estas unu el pli malfacilaj kaj postulas sufiĉe grandan lertecon fianke de la turistoj. Dum la ekskurso estas necesegaj malpeza sed varma kostumo, bastono ĉirkaŭforĝita kaj fortikaj sed ne pezaj kaj ne tro malvastaj botoj. Ne malutilos tekruĉo, sed estas konsilinde ne kunprenadi tro grandajn ilojn, kiuj malfaciligus al ni la suprengrimpadon. Necesa estas turista sako. Fotografilo estas tre dezirinda Krom tio oni devas provizi sin per nutraĵoj kaj trinkaĵoj.

Provizitaj ni eliras frumatene el Zakopane tra la stratoj Krupówki, Zamojskiego kaj komencante de Muzeo de Chałubiński, tra oportuna ŝoseo, meze de ombroriĉaj arbaroj. Antaŭ la unua ponto sur la rivereto „Foluszowy“ ni preteriras la ŝoseon, kondukantan al Morskie Oko. Sur tiu vojo veturas tiuj, al kiuj la fortoj ne permesas suprengrimpi kaj kiuj preferas oportune per veturilo atingi la lagon. Sed ni piedi



Kościelec — Świnica.

rantoj atingas „**Kuźnice**", kiu ĝuste estas la elirpunkto por ĉiuj pli gravaj Tatraj ekskursoj. En Kuźnice ekzistas modele aranĝita, virina lernejo por hejma mastrumado (vizitinda!)

Transirinte la ponton sur la rivero „Bystra", ni suprengrimpas jam senĉese sur dek ivoj de arboriĉa „Boczań"-monto, ĝis ĝia pinto. De ĉi tie bela panoramo sur Kuźnice, Giewont kaj Jaworzynka. Sur mallarĝa vojeto inter granitaj rokoj, kovritaj tie kaj ie per montpinoj ni atingas sufiĉe krutan, kalkan deklivon, de kie post 2½ horoj ni atingas la rifuĝejon sur „**Hala Gąsienicowa**" kaj post 25 minutoj ni estas jam en malgranda rifuĝejo ĉe „**Kościelec**". Ĉe ĝiaj piedoj etendas sin la belega „**Czarny Staw Gąsienicowy**" (Nigra lageto de Gąsienica 1620 m). Ĝia akvo plej ofte safirblua, 47 m profunda, montras ĉiujn kolorojn de ĉielarko, kiam la suno, trapenetrinte dum tagmezo la mallarĝan malfermaĵon inter „**Żółta Turnia**" (2088 m) kaj la sovaĝaj „**Granaty**" (2232 m) ĵetas sur la lagon siajn radiojn. Sude etendiĝas la fieraj pintoj de „**Kozie Wierchy**" (2295 m) kun dividanta ilin „**Zamarzła Turnia**" (2189 m) kaj okcidente finas ĉi tiun vicon akraj pintoj de „**Mały**" kaj „**Wielki Kościelec**" (2159 m).



Granaty.


Apud la maldekstra bordo de „Czarny Staw“ ni grimpas pluen. Havante ĉe la piedoj malgrandan lageton „**Zmarzły Staw**“ (1785 m; temp.: 12·3° C.) ni supreniras krutan rokon, kaj tenante nin jen je la krampoj kaj ĉeno, jen je la apudvoja barilo, ni atingas post duonhoro la pinton „**Zawrat**“ (2158 m).

La vidaĵo de ĉi-tie estas simple grandioza. Antaŭ ni etendiĝas parto de la ĉarma valo „**Pięć Stawów Polskich**“ (Kvin Polaj lagoj). Inter granitaj rokoj briletas la spegul-simila supraĵo de kvin lagetoj. De tie ni vidas preskaŭ ĉiujn pintojn de Tatraj montoj.

Sur kruta vojeto ni malsupreniras al Kvin lagetoj, kaj turninte nin dekstren, ni grimpas sur la plej altan en tiu ĉeno pinton „**Świnica**“ (2306 m). La panoramo ankoraŭ pli bela, pli vasta. Antaŭ ni kvazaŭ grandega arbaro, staras gigantaj Tatraj pintoj, sovaĝaj montdorsoj, nudaj kaj senmovaj.


Reveninte en la valon de Kvin lagoj, ni rapidas al rifuĝejo ĉe „Wielki Staw“, ĉar la trouzitaj fortoj postulas refreŝigon. Post ripozo ni supreniras ĝis rivero „**Roztoka**“ kaj tra samnoma valo ĝis la famekonata en la Tatroj akvofalo „**Siklawa**“.

Atinginte la pinton „**Świstówka**“ (1774 m) valoras devojiĝi iom norden ĝis la bordo de profunda




Granaty — Kozi Wierch.

abismo (300 m). La panoramo, kiu de ĉi tie etendiĝas, estas unu el la plej belaj en la Tatra montaro.



Vintraj sportoj.

Sur tiu sama vojo ni revenas al Kvin Lagoj kaj post du horoj ni estas ĉe „**Morskie Oko**“ (1393 m)




Pintoj Mięguszowieckie.

la plej bela el ĉiuj Tatraj lagoj. Ĉiuflanke ĉirkaŭas ĝin nudaj altaj pintoj, ofte dum somero neĝokovritaj [„**Siedm granatów**“, „**Żabi niżny**“, „**Rysy**“, „**Mięguszowiecki**“ (2437 m), „**Mnich**“ (2064 m)]. „**Morskie Oko**“ estas interalie pro tio atentinda, ke ĝi estas en la Tatroj la sola lago, en kiu vivas trutoj kaj salmoj.

En boato ni transnaĝas la lagon kaj suprengrimpas ĝis la lageto „**Czarny Staw**“ apud Morskie Oko. Ĝi kuŝas en sovaĝa rondvalo, meze de granitaj rokoj.

La homo staras ĉi tie kiel senforta kreitaĵo kaj sentante sian malfortecon kaj vantecon, li forkuras de tiuj rokaj monstroj.

Reveninte al rifuĝejo ni luas veturilon, per kiu sur bona ŝoseo, haltinte nur ĉe la belega „**Akvofalo de Mickiewicz**“, ni revenas al Zakopane.




Granda Pinto Wideł.

## Listo de la plej vizitataj tatraj valoj kaj pintoj.

**Valo Kościeliska.** Unu el la plej belaj Tatraj montvaloj estas sendube la vasta valo „Kościeliska“ en sudokcidenta flanko de Zakopane. Piede ĉu per veturilo ni rapidas el Zakopane tra stratoj Kościeliska kaj Skibówki kaj ni iras sur deklivoj de „Hruby Regiel“ (1339 m) kaj de „Turnia Kończasta“ (1312 m); meze de gigantaj maljunaj piceoj. Tra pordego de Kantak ni eniras sur vastan, de arbaro ĉirkaŭitan herbejon „Kira Miętusia“. Atinginte restoracion, ni iras maldekstren al „Źródło lodowe“ (Glacia fonto 967 m temp. 14·3⁰ C.). La valo mallarĝiĝas, formante t. n. „Brama Kraszewskiego“ (Pordego de Kraszewski). La panoramo disvastiĝanta ĉi tie, estas simple nepriskribebla.

Trairinte la „Roztoka-riveron“ ni suprengrimpas la fantazian, krudan rokon „Organy“ (Orgeno) kaj atingas la grandiozajn grotojn „Mylna“ kaj „Raptawicka“. Tra 26 m longa koridoro ni atingas fene-



Granda kaj Orienta Pinto Wideł kaj Kiezmarskiego.


stron en la roko, de kie videbla estas vasta kaj belega panoramo. Tra dekstra koridoro ni atingas la groton „Mylna“ 81 m longan. La groto „Raptawicka“ posedas belan enirejon kaj vastajn kamerojn, atingeblajn nur per ŝtuparo. Konsilinde estas kunpreni torĉojn aŭ lanternojn.

Irante antaŭen tra la valo, ni alvenas al ŝtono kun kruco kaj surskribo „I nic nad Boga“ (Kaj nenio super Dio). De ĉi tie post unuhora irado oni povas atingi la lagon „Smereczyński“.

Revenante, ni turnas nin ĉe „Pisana“ dekstren kaj post kelkaj minutoj ni staras antaŭ enirejo en mallarĝan intermonton, nomatan „Tatra Kraków“. La ĉi-tiea loĝantaro vidas en ĝi similecon al Krakovaj konstruaĵoj.

Nun ni devas jam reveni, ĉar la suno komencas malleviĝi. La griza krepusko eliras el intermontoj kaj abismoj, la nudaj rokoj alprenas homan formon kaj kliniĝante, ripetas iajn misterajn eĥojn. Ni revenas sur sama vojo meze de bruantaj riveretoj kaj maljunaj arbaroj.

**Giewont** (1900 m) alta, nuda roko en suda parto de Zakopane. La popola fantazio vidas en ĝi formojn de dormanta heroo. Sur la pinto — fera 12 m alta krucifikso. Vojo: Tra Kuźnice — Kalatówki —




Anasa pinto Kaczy szczyt).

Przełęcz Kondracka — 4 h. Belega vasta vidaĵo sur Zakopane, sur la tutan submontaran valon kaj Altajn Tatrojn.

**Czerwony Wierch** (2101 m). Vojo kiel sur Giewont, de Hala Kondracka suden. Belega vidaĵo sur okcidentajn Tatrojn.

**Antałówka** (962 m) arbara monteto. El ĝi bela vidaĵo sur okcidentajn Tatrojn kaj sur valon de Zakopane.


**Koziniec** (952 m) monteto inter Zakopane kaj Bystre. El la pinto bela vidaĵo sur okcidentajn Tatrojn ĝis „Osobita“ monto.

**Vojo ĉe Regle,** nomata ankaŭ „fera vojo“ kunligas enirejojn al kelkaj valoj. El Zakopane tra vojo al Kuźnice ĝis vilao „Księżówka“ — piede 30-40 min. De tie en direkto al enirejo en **valon „Białego“** 20 min. — en valon „**ku Dziurze**“; en valon „**Strążyska**“ kaj „**Za Bramką**“ ĝis enirejo en valon „**de Mała Łąka**“ 1½ da horo. De tie reveno al Zakopane sur ŝoseo Zakopane-Kościeliska en daŭro de 40 min.

**Jaszczurówka** (908 m) ĉe piedoj de Kopieniec, apud enirejo en valon „**Olczyska**“ ĉe ŝoseo kondukanta al Morskie Oko. 4 km el Zakopane. Dum julio kaj aŭgusto veturas omnibuso. En Jaszczurówka troviĝas fontoj, ŝprucantaj el piedoj de Nosal-monto




Vidaĵo el Kosista sur Kozie Wierchy, Granaty kaj Świnica.



Deklivoj de Kopieniec.



kaj posedantaj ĉiam la temperaturon de 20·4° C. Banoj — 2 hoteloj — vilaoj — restoracio.



Ekzercoj de Societo por tuja helpo.

**Gubałówka** (1123 m). Vasta monteto, ŝirmanta Zakopane de la norda flanko. El pinto (ĉe krucifikso)

grandioza kaj vasta vidaĵo sur la tutan ĉenon de Tatraj montoj.

**Valo „Olczyska“**. De Jaszczurówka 40 minutoj al „Wywierzysko Olczyskie“, fonto ellasanta 1000 litrojn da akvo en 1 sekundo.


**Valo Białego** ĉe norda flanko de Giewont'a montdorso.

**Valo „Ku Dziurze“** en okcidenta direkto. En orienta deklivo de la valo — groto „Dziura“.

**Valo Strążyska** unu el la plej belaj valoj en Tatraj montoj. Ĝi komenciĝas ĉe nuda roko de Giewont. Plie „Siklawica“ 13 m alta akvofalo. Belega vidaĵo sur Giewont-monton.

**Przysłop Miętusi** (1295 m) arbarkovrita montdorso inter Mała Łąka kaj valo „Miętusia“. Belega piedvojo al valo Kościeliska. El Zakopane 2 h.

**Hala Kalatówki**. El Kuźnice de restoracio dekstren. En arbaro—ermitejo de Fratoj de S-ta Francisko. Post 40 min. oni atingas vastan herbejon kun paŝtistaj kabanoj.



Ganek kaj Wysoka.

## Pieniny.

Ci tiu izola, karakteriza, el kalkaj rokoj konsistanta montaro estas trarompita de la rapidflua rivero Dunajec.

Por atingi la montaron Pieniny oni devas fervoje veturi al la urbo Nowy Targ; de tie oni veturas pluen per veturilo, ĉu al 1) Czorsztyn (21 km — prezo de unuĉevala fiakro 8 Kor. de duĉevala 14 Kor.) ĉu al 2) Czerwony klasztor (33 km — prezo de unuĉevala fiakro 12 Kor., de duĉevala 16 Kor.).

En Czorsztyn aŭ en Czerwony Klasztor oni luas boatojn, en kiuj povas sidi nur po 2 personoj kaj kiujn oni kunligas po 2 3, 4, k. t. p. laŭ bezono. Prezo de boato el Czorsztyn 5 Kor., el Czerwony Klasztor 3 Kor.

En primitiva boato ni naĝas sur la arĝentbrilaj ondoj de la monta rivero Dunajec.

Ĉi tiu vojo prezentas tiom da grandiozaj, senĉese ŝanĝiĝantaj pejzaĝoj, ke similajn oni nur malofte povas renkonti en la mondo.



Unu el la plej belaj kaj impresigaj montpintoj en Pieniny estas la pinto „**Trzy Korony**“ (Tri Kronoj) kun ruinoj de antikva kastelo, konstruita en la XIII. jc. de la reĝino Kinga.

Ĉe la fino de tiu romantika vojo kuŝas la banloko **Szczawnica**.

KSIĄŻNICA PODLASKA
im. Łukasza Górnickiego
Nr 4192
FILIA Nr 14
w Białymstoku

Mag. Pharm.: de Clossman.

# DROGEJO

PARFUMEJO, APOTEKA MAGAZENO.

Vendejo de fotografiloj kaj ĉiuj fotografaj utensiloj.

FOTOGRAFA MALLUMEJO.

Lornetoj, Okulvitroj, Nazumoj.

**POR AŬTOMOBILOJ**

vendejo de benzino kaj ŝmiroleo.

Dent-Har-Vest-**brosoj** k. t. p. **Kombiloj** por sinjoroj kaj sinjorinoj. **Ĉokoladoj, Konjakoj, Vinoj**.

Kolonja akvo, Franzbranntwein.

**MINERALAJ AKVOJ.**

**PERSONA PESILO**

Zakopane — Strato: Krupówki.

**kontraŭ la Hotelo „Morskie Oko"**

Telefono N-o 29





## BAZAR PRZEMYSŁU KRAJOWEGO

W ZAKOPANEM — KRUPÓWKI

poleca towary modne, artystyczne wyroby drzewne w stylu zakopiańskim, sabałówki haftowane i serdaki futrzane.

CENY BARDZO NIZKIE.

**I. G. I. KOMENDZIŃSKI**

BAZARO DE ENLANDA INDUSTRIO EN ZAKOPANE KRUPÓWKI

rekomendas modajn komercaĵojn, artoplenajn lignoskulptaĵojn en stilo de Zakopane, broditajn jakojn kaj montanajn peltetojn.

PREZOJ TRE MALALTAJ.

PENSYONAT PENSIONO

## J. PRZYSTOJECKIEJ

## „PIOTRKOWIANKA"

w parku świerkowym, między ul. Jagiellońską i Sienkiewicza. Pokoje słoneczne. Ceny od 7 koron. System korytarzowy.

Meze de picea parko, inter Jagiellońska-kaj Sienkiewicza-Stratoj. Ĉambroj sunplenaj. Prezoj de 7 kronoj. Koridora sistemo.

ANTONI KRZYŻAK
Zakopane, Krupówki Nro 30.
Magazyn towarów galanteryjnych, modnych. Przybory do szycia i haftu.
Magazeno de galanteriaĵoj kaj modaĵoj. Iloj por kudrado kaj brodado.

„GIERLACH“
POSEDANTINO DE LA PENSIONO:
ANIELA DE DEMBIŃSCY BORNE
STRATO KRUPÓWKI.
Malproksime de la strato en propra ĝardeno. La domo tute renovigita; 24 ĉambroj, Vastaj sudaj verandoj; Akvokondukoj; Banejoj. Ĉambroj sen manĝoj de 2—6 kron; kun manĝoj de 6—10 kron; Kuirejo unuaranga kaj higiena. Salono por amuzado. Fortepiano,



„PODLASIE“
PIEWSZORZĘDNY PENSYONAT
Świeżo powiększony. Pokoje z wykwintnem utrzymaniem. Wspaniały widok na góry. Położenie słoneczne. Łazienka, wodociągi i ogród wokoło domu, połączony z lasem. Telefon. Ceny od 7—12 K.
UNUARANGA PENSIONO
Jus pligrandigita. Ĉambroj kun plej bona pensiono. Belega vidaĵo sur montojn. Situacio sunplena. Banejo, akvokonduko kaj ĝardeno cirkaŭ la domo kunligita kun arbaro, Telefono. Prezoj de 7—12 K.

PENSYONAT MARYI DĄBROWSKIEJ
W ZAKOPANEM OTWARTY CAŁY ROK
WILLA „WANDA“
Położony w uroczem miejscu wśród świerkowego parku. Pokoje z całodziennem utrzymaniem; wydaje również obiady i kolacye. — Telefon na miejscu. Rozmowa w języku polskim, francuskim, niemieckim i rosyjskim.
PENSIONO DE MARIO DĄBROWSKA EN ZAKOPANE MALFERMITA LA TUTAN JARON
VILAO „WANDA“
En plej ĉarma ĉirkaŭaĵo, meze de picea parko. Ĉambroj kun tuttaga pensiono; oni liveras tag kaj vespermanĝojn ankaŭ ekster la domon. Telefono. Oni parolas: pole, france, germane kaj ruse.

„ZAKĄTEK"

ZAKOPANE, CHRAMCÓWKI 44.

**Pensyonat** otwarty cały rok. Korytarze ogrzewane. Wodociągi. Telefon. Osobna leżalnia.

**Pensiono** malfermita la tutan jaron. Koridoroj hejtataj, Akvokondukoj Telefono. Aparta kuŝejo.

MAGAZENO KAJ VENDEJO DE

KÓŁKO ROLNICZE

EN ZAKOPANE

**Krupówki, kontraŭ la poŝtoficejo.**

Vendejo de konsumartikoloj, grenoj, terproduktoj kaj artaj sterkoj. Landa Agentejo de salvendado.

**Filio: Str. Chramcówki.**



Pierwszorzędny magazyn krawiecki damski i męski

JAN KOWALSKI

W ZAKOPANEM.

Odznaczony medalem i krzyżem w Londynie w r. 1910. Poleca: własnego wyrobu kostyumy oraz ubrania męskie. Materyały krajowe, angielskie, czeskie.

**Żurnale każdego miesiąca.**

Unuranga tajlora magazeno por sinjoroj kaj sinjorinoj

JAN KOWALSKI

EN ZAKOPANE.

Premiita per medalo kaj kruco en Londono 1910. Rekomendas: kostumojn kaj sinjorajn vestojn de propra farado. Ŝtofoj enlandaj, anglaj, bohemaj.

**Modeloj ĉiumonate novaj.**

Unuranga nove malfermita pensiono. Domo sur monteto. Suda flanko. Centra hejtado. Prezoj kun manĝoj de 7 kronoj supren.

MODRZEJÓW

ZAKOPANE — JAGIELLOŃSKA 3.

**PIERWSZORZĘDNY NOWO OTWARTY PENSYONAT.**

Dom na wzgórzu. Wystawa południowa. Centralne ogrzewanie. Ceny en pension od 7 koron zwyż.

# „KRYWAŃ"

ZAKOPANE, OGRODOWA 5.

PENSYONAT ZARUSKICH

PENSIONO DE GESINJOROJ ZARUSKI

WIDOK NA GÓRY. ŁAZIENKA.

TELEFON.

BELEGA VIDAĴO SUR LA MONTOJN. BANEJO. TELEFONO.

INSTITUTO DE ARTA FOTOGRAFADO

# „STEFA"

DE H. SCHABENBECK

ZAKOPANE — STR. KRUPÓWKI 57.

Faras ĉiuspecajn fotografaĵojn tiel en kiel ankaŭ ekster la Instituto dun kunvenoj kaj ekskursoj. Akceptas amatorajn laborojn por plibonigo.

# PENSION „LILIANA"

EN ZAKOPANE.

Rekomendas dum la tuta jaro ĉambrojn komencante de 7 Kr. Regiono seka kaj sunplena. Ĉia komforto. Kanalizado.

Reccomande chambres et pension depuis 7 K. par jour. Situé: coté, soleil. Cuisine soignée. Tout le comfort désirable. L'eau et canalisation à tout étage.

# „STELLA"

KRAKÓW, STR. KARMELICKA 46.

**Rekomendinda pensiono**

Cambroj komforte meblitaj. Banejo. Bonega hejma kuirejo. Proksime stacio de elektra tramo. Prezoj en pension de 6 K. tage.

**Polecenia godny pensyonat**

Pokoje pięknie umeblowane. Łazienka. Wykwintna kuchnia domowa. Stacya tramwaju w pobliżu. Ceny en pension od 6 Kr. dziennie.

Unuaranga HOTEL-PENSIONO

„KLEMENSÓWKA"

En plej bela kaj plej saneca parto de Zakopane, meze de 4 morga parko, ĉe Str Jagiellońska N-o 38. Telefono N-o 31. 55 ĉambroj komforte aranĝitaj. Akvokonduko, Kanalizo, Banejoj, Lawn Teniso. Ĉevaloj kaj Kaleŝoj.

**Elektra lumo.**

**Brust-malsanulojn oni ne akceptas. Vintre la Hotel-pensiono fermita.**

Ĉambroj komencante de 2 kronoj, kun manĝoj de 7 kronoj tage.

Książnica Podlaska
im. Łukasza Górnickiego w Białymstoku
000988232